408.92 : 526 : 061.3(100)(438.31)„1959"
*E 092.1 : 526*

## PRESKAŬ MODELA PORESPERANTA AGADO DE GEODEZIISTOJ

De 9-a ĝis la 12-a de septembro 1959 okazis en Krakovo (Pollando) internacia simpozio por geodeziaj kalkuloj, sub patroneco de Internacia Geodezia Komitato. La simpozio estis tre grava por nia movado, ĉar ĝi montris kiel oni povas labori por esperanto en faka medio. Pro tio mi deziras priskribi la preparan kaj dumkonferencan agadon de esperantistoj.

La preparoj por la simpozio venis preskaŭ samtempe kun la preparoj por fondi Internacian Studrondon por Geodezio (ISG). Tial geodeziistoj-esperantistoj estis en ofta kontakto dum la preparlaboro, en kio aktivis precipe mag. W. Senisson el Varsovio. Danke al li la unua cirkulero pri la simpozio estis multobligita ankaŭ en esperanto (krom kelkaj aliaj lingvoj). El tio sekvis ke la simpozion partoprenis ankaŭ kelkaj esperantistoj, ne nur per la sola ĉeesto sed ankaŭ kun siaj raportoj). Krom tio en polaj geodeziaj gazetoj aperis en esperanto: informo pri la simpozio (dissendita ankaŭ kiel represaĵo), informo pri la fondota ISG kaj salutvortoj al partoprenontoj de la simpozio (krom kelkaj unuaj esperantaj resumoj de sciencaj artikoloj). Per si mem ĉio tio estis bonega propagando por esperanto en sciencaj rondoj.

Alvokita partopreni la simpozion per parolado pri utiligo de krakovjoj en astronomio, mi faris mian raporton en esperanto, kun aldono de franca traduko, ĉar esperanto ne troviĝis inter la lingvoj uzeblaj dum la konferenco. Ankoraŭ kvar aliaj raportoj estis preparitaj en esperanto. Tiam la polaj esperantistoj-geodeziistoj sukcesis ke ankaŭ esperanto fariĝu la oficiala lingvo, sed bedaŭrinde tre malfrue. Tiel okazis ke mi mem ne ricevis la lastan cirkuleron kaj (ĉar mi estis inter la unuaj parolantoj) mi ne eksciis ke mi povas legi la originalan raporton. Ne sciante tion, prof. H a u s b r a n d t iom malkuraĝiĝis kaj pro tio li parolis pole.

Tio estis verŝajne la sola malagrablaĵo por ni, kaŭzita per nesufiĉa antaŭa kontakto kaj interna informado de esperantistoj. Por kompensi tion ni kontaktiĝis pli bone dum la simpozio, precipe en eksteroficialaj renkontoj, kie ni al multaj homoj montradis je la lingvaj malfacilaĵoj kaj je la bezono de internacia lingvo, kun klarigoj pri esperanto. Precipe dum la bankedo en la Urba Prezidantaro ni ofte ŝanĝadis la kunparolantojn kaj en tre agrabla atmosfero, sen troa altrudo, ni konvinkadis homojn. Dum interparolado ni „neintence" venadis al la lingva problemo kaj kun argumentoj, sen ekscitiĝo, ni „solvadis" la problemon.

Ni konstatis ke multaj partoprenantoj simpatias nian lingvon kaj post interparoloj la simpatioj certe pligrandiĝis. Por korekti mian nelegon de esperanta originalo, mi prenis la parolon en diskutado pri unu statistika temo. Elektinte plej internaciajn vortojn mi parolis malrapide, tiel ke la diskuton povis kompreni ankaŭ partoprenantoj nesciantaj esperanton. En la komenco mi rimarkis kelkloke iun flustradon, verŝajne primokan, sed tuj kiam ili rimarkis ke la parolado estas komprenebla, ili tre atente aŭskultis ĝis la fino. Atente estis aŭskultitaj ankaŭ la vortoj de prof. H a u s b r a n d t, same en esperanto. En postaj interparoloj ni konvinkiĝis ke ili vere komprenis la diskuton, kion ni utiligis por plifortigi la simpatiojn por esperanto.



Por havi pli grandan utilon de la laboro, ni interkonsentis ke mi parolu pri la lingva problemo dum sciencaj konferencoj, en konvena (neĝena) okazo, en interkonsento kun la prezidinto de la simpozio prof. O d l a n i c k i (kiu same varme simpatias esperanton). Sed tia okazo ne montriĝis kaj ni interkonsentis ke mi skribu artikoleton pri la sama problemo, kiu aperu kun aliaj artikoloj de la simpozio. La prezidinto konsentis tion, mi skribis la artikoleton kaj mi esperas ke ĝi aperos (kune kun minimume 4 simpoziaj artikoloj en esperanto).

Pro ĉio tio mi nomis tian agadon „preskaŭ modela". Por alia simila simpozio geodeziistoj-esperantstoj povas ekagi kun pli grandaj deziroj kaj ili povos sukcesi. Aliaj fakuloj povas certe utiligi la spertojn de geodeziistoj.

prof. B. Popoviĉ

## IMITINDA EKZEMPLO

045 = 089.2
*5(04)*

La januara numero de **„Esperanto"** (1961) raportas, laŭ informoj en **Jugoslavia Esperantisto,** pri la aktivado de nia sekretario, Prof. B. P o p o v i ĉ. Ekde 1956 li konstante verkas kaj aperigas sciencaĵojn en Esperanto. En la bibliografio de liaj sciencaj verkoj troviĝas 29 titoloj. El tiuj verkoj 13 estas verkitaj plene en Esperanto, kaj 5 havas resumon en Esperanto. Sekvu ĉi tiun ekzemplon ĉiuj esperantistaj sciencistoj kiuj publikigas rezultojn de sia laboro. Dankon kaj gratulon al Prof. P o p o v i ĉ.

523.841.9 : 523.895

## ALVOKO AL AMATORAJ ASTRONOMOJ SUR LA SUDA DUONSFERO

### PETAS PRI SCIENCA KUNLABORO LA KRAKOVA ASTRONOMIA OBSERVATORIO

**Observu la eklipsiĝantajn stelojn sur la suda ĉielo!** — Ni petas personojn kiuj, ne estante profesiaj astronomoj, havas eblon uzadi teleskopon, observi malfortajn eklipsiĝantajn stelojn de la suda duonsfero.

Steloj eklipsiĝantaj distingiĝas per tio, ke ilia lumo neatendite malfortiĝas dum kelkaj horoj kaj poste subite revenas al la antaŭa intenso. Ĉi tiu fenomeno estas simple klarigebla. La stelo eklipsiĝanta, ŝajne simila al aliaj steloj, konsistas el du reciproke proksimaj steloj. Ambaŭ